

AVENO #50 - Verdaj Partioj & Esperanto - 2024

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazaĵoj, rilato de Verdaj Partioj kun Esperanto.

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj ĉefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ĝis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaĝon al la sekretario de AVE: AVE@verduloj.org
Gravas scii kiom ni estas.

= = =

= =

2024-04-24 Bas Eickhout - unu el la pinto-duopo de la Verduloj por la estonta EP.

Nur hodiaŭ videbla ĉe Arte.tv !

En tiu ĵurnalo (21 minutoj, en la franca kaj germana) ni trovas post la 3a minuto ĝis la 12a la temon pri ekologio kaj agrikulturo en EU, kaj aparte la ne imageblan rezignon je la „Green-Deal“ (Verda distribuo/ekologia agado) kaj sekve de tio, ke la Komuna Agrar-Politiko ne plu respektos la celon de natur-konforma agrikulturo de EU.

Ili intervjuis Bas Eickhout pri ĉi tiu temo. Li komprenas ke multaj bienuloj havas tro malaltajn enspezojn, ĉar inter ili kaj la konsumantoj troviĝas la merkato de la distribua industrio, kiu difinas la prezojn.

Aliflanke, se la bienuloj ricevas subtenon de EU oni postulas de ili ioman burokracion.

Plejparte tiu mono estas disdonita laŭ la areoj (simple kontrolebla), kaj tiu malgranda parto kion la kampanoj aparte traktas ekologie devas esti deklarita tute kontrolebla.

<https://www.arte.tv/de/videos/117013-083-A/arte-journal-24-04-2024/>

= =

2024-06-09 Voĉdonado por la EU-parlamento - bonvolu voĉdoni

Se vi estas civitano de Eŭropa Unio vi certe scias ke en Junio ni denove elektas parlamentanojn por la sekvaj 5 jaroj. Jen la informo kaj ligiloj al la Manifesto de Eŭropaj Verduloj en la angla kaj 19 aliaj lingvoj - mi esperas ke por ĉiu civitano ĉe-estas lingvo kiun ŝi aŭ li komprenas. La pura teksto de tiu mesaĝo bezonas ĉ. 35 paĝoj - ĉeestas fotoj por pli bone imagi la temojn, kaj sufiĉe da spaco por fari komentojn.

Se Vi volas, bonvolu traduki ĝin en Esperanto - mi ne havas kapaciton nun:*

<https://europeangreens.eu/courage-to-change-our-message-to-voters/>

Ne malesperu, jen vi trovos la ligilon al ilia programo de 2006 en Esperanto:

<https://europeangreens.eu/charter-of-the-european-greens/#translations>

Jen la retejo de nia EP-koalicio de Verda, Regionalista kaj Pirata Partioj en 13 lingvoj:

<https://www.greens-efa.eu/de/newsroom/press-releases>

Por ekster-EU-landanoj kies lingvo ne ĉeestas, bonvolu legi la programon de la Tutmonda Asocio de Verdulaj Partioj de la jaro 2023, kiu estis decidita en Incheon - kie niaj geamikoj en Suda Koreio bele engaĝiĝis montrante Esperanton al la Verduloj, kaj diskutante kun ĉirkaŭ 30 partoprenantoj. Jen ila Tutmonda Ĉarto de la Verdaj Partioj en Esperanto:

http://www.verduloj.org/GG%20Charto%202023_eo.pdf

*) Se ni estus pli da verd-partianoj kiuj parolas Esperanton, ni havus la ŝancon denove enmeti nian temon de lingva justeco kaj montri la potencialon de Esperanto en ilia programo.

Kompreneble AVE ja rilatas al la Verdaj Partioj (partio de verduloj), pro tio mi rajtas instigi Vin, se Vi estas civitano de EU, bonvolu iri voĉdoni kaj elekti la kandidatojn de la Verda

Partio de Via lando.

Cetere, ĉifoje estas pinto-duopo por tuta EU: Bas Eickhout kaj Terry Reintke

<https://europeangreens.eu/>

Jen ŝia retejo: <https://terryreintke.eu/>

En Esperanto (pli detale en la angla, ktp): https://eo.wikipedia.org/wiki/Bas_Eickhout

= =

2024-02-01/04 Eŭropa Kongreso de la Verdulaj Partioj - 40 jaroj da kunlaboro de AVE

Tiu okazis de en Liono, estis entute 30 partioj kaj 1200 partoprenantoj.

Ĉirkaŭ 50 vizitis nian informtablon, kaj kelkaj rakontis pri familiano kiu parolas/is Esperanton. Inter ili juna virino el Irlando, kiu kunportis salutojn de Christopher Fettes, kunfondinto de AVE kune kun Maire Mullarney; ŝiaj 2 libroj pri Esperanto kaj pri lingvopolitiko trovis grandan intereson; same la lernolibro „Esperanto by direct method“ de Stano Marček, kiu intertempe haveblas en ĉ. 40 lingvoj.

Apud ni estis la tablo de „Heinrich Böll Fonduso“ de la germanaj Verduloj - ili estimis ke ni montris la tradukon de lia politika rakonto „La perdita honoro de iu Katarino Blum'“, tradukita de Rikardo Ŝulco, printita en GDR. La temo manipuli realecon fare de fi-jurnalismo (por altigi la profiton) estas aktuala ankaŭ hodiaŭ.

La intereso je la potencialo de Esperanto varias laŭ la landoj. Ĉar ene de EELV - la verdula partio de Francio - laboras komisiono pri Esperanto. Ilia programo enhavas la postulon instrui Esperanton en lernejoj. Tial venis pluraj de tiu partio.

La ĝenerala lingvo estis la angla; nur la plenaj sesioj estis tradukitaj almenaŭ en la francan - kaj la anglan.

Tiu kongreso samtempe estas la komenco de la elektokampanjo por la sekva Eŭropa Parlamento. Ili elektis la 2 pinto-personojn por tuta EU-kampanjo: Bas Eickhout el Nederlando kaj Terry Reintke el Germanio.

Jen la ret-ligo al la aktualaj dokumentoj:

<https://europeangreens.eu/lyon2024>

Inter ili la listo de partioj (ene de EU kaj ekstere de EU), kaj la manifesto sur 3 + 43 paĝoj kun 3 bazaj temoj. Je la komenco de ĉiu temo ili montras ekzemplojn el la reala vivo de homoj:

- Ekologia respondeco kaj sociala kunvivado
- Demokratio, feminismo kaj Homaj Rajtoj
- Unio de sekureco, paco kaj globala justeco

<https://europeangreens.eu/adopted-documents/>

- = =

2024-01 AVE partoprenos la

<https://europeangreens.eu/lyon2024>

2024-01 Nova Politiko en Pollando kune kun Verduloj (Zieloni)

Urszula Zielińska iĝis Ministrino pri Klimato kaj Naturmedio en la kabineto de Donald Tusk. La Verduloj/Zieloni partoprenis la elekto-kampanjon kadre de Civila Koalicio, KO. Eble vi rememoras ke la malnova registaro provis per maldemokratiaj rimedoj malhelpi la ŝanĝon. Bondezirojn al bona politiko.

Ĉi-kaze mi vidis la informon ke nuntempe estas Verduloj en koaliciaj registaroj de 7 EU-landoj: Aŭstrio, Belgio, Germanio, Irlando, Latvio, Pollando kaj Hispanio.

<https://europeangreens.eu/news/green-deputy-minister-joins-polish-government/>

Komento de Lars Sözüer:

La registaro de Svislando konsistas el sep ministroj, kiuj pro principo de konkordo venas - ĝenerale dirite - el la kvar plej fortaj partioj.

Kvankam la kvara plej forta partio estis en 2019 la verdula partio GPS, membro de la Eŭropaj Verduloj, ili ne sukcesis elektigi sian kandidaton en la registaron.

En 2023 ili estis la kvina plej forta, kaj tamen kandidatis, kio bone kongruas kun la konkorda principo, sed ankaŭ ĉi-foje ne sukcesis.

Krom la sep ministroj, estas plia membro de la registaro nomata kanceliero, kies rolo estas eble komparebla al la ĉefo de la kanceliera oficejo en Germanujo.

Tiu nun estas Viktor Rossi de la verd-liberala partio GLP, kiu ne estas membro de la Eŭropaj Verduloj.

Tiusence en Svislando verdulo partoprenas en la federacia registaro.

- - -

2024-01 **Kaŝitaj sekretoj de arbaroj**

Temas pri kunveno de EU-parlamentanoj (de Verduloj kaj aliaj) kun fakuloj kiu daŭras 3 horojn ! Mi nur rapide traserĉis - mankas fotoj kiuj povus klarigi kion ili rakontas.

<https://www.youtube.com/watch?v=2zYKJnOAPSM>

- - -

La sekvaj koncizaj dokumentaj videoj (ĉ. 5 min) de EU-Parlamentanoj estas parolataj en la angla, kaj tradukitaj (de mia sistemo) aŭtomate en Esperanton.

2024-01 **Investado en EU - bezonas pli da mono**

Jen video de Philippe Lamberts, MEP, kiu klarigas kial la novaj reguloj limigi la ŝtatajn ŝuldojn al 90%. Kompare kun landoj kiel Usono aŭ Japanio tio estas malalta - tro malalta por bone evolui cele al daŭropoveco.

<https://www.youtube.com/watch?v=deUx2Xt9BfI>

- - -

2024-01 **Re-porti naturon al Irlando:**

Ili montras kiel paludo-kulturo funkcias, jen konciza video pri Irlando:

<https://www.youtube.com/watch?v=RvNWIUt7rOw>

- - -